

Oficiala organo de Oomoto kaj Ĵinrui Aizen-kai (UHA)

Oomoto

n-ro 455
2008
jan.-dec.



ISSN 0388-0672

Helpe al la alvenigo de la monda paco, nove disvolviĝanta sur la vasta tero de Mongolio

AGOU Takaŝi

La 9an de junio en 2008, solene kompletigis la Mongola Centro de Universala Homama Asocio (UHA) en la urbo Ulanbatoro, Mongolio, post du kaj duona jaroj de ĝia ekkonstruo.

Por ke Oomoto kaj UHA kune festu ĝin, du karavanoj konsistataj el 53 oomotanoj, inkluzive de brazila junulo, partoprenis ĝian celebradon, kun aparta alesto de la majstrino DEGUĈI Kurenai, la spirita gvidantino de Oomoto kaj honora prezidanto de UHA, kaj de s-ro ŜIMAMOTO Kunihiko, la prezidanto de UHA kaj de la ĉefdirektoro de Oomoto.

Dume, 17 el ili ankaŭ unuafoje partoprenis en la 2a Mongola Kongreso de Esperanto, samtempe okazigita en la Kultur-Eduka Universitato de Mongolio fare de Mongola Esperanto-Societo. Jen estas skiza raporto pri karavana vojaĝo en Mongolio.



Oomoto, EPA, UHA kaj Mongolio

La majstro DEGUĈI Onisaburo, la Kunfondinto de Oomoto fondis la organizon “Esperanto-Populariga Asocio (EPA)” en junio, 1923, kaj la sekvantan februaron li celis vojaĝi al Mongolio,



kuraĝe praktikante Dian revelacion “La fundamento de monda paco estas spirita kaj morala paciĝo en Azio” . Laŭ tio pratempa mongolio estis la loko, kie la Dio nomata Susanoo-no-mikoto misie eklaboris por regi la mondon paca.

Kun Dia mesaĝo li surtere transiris la duonan insulon de Koreio kaj tra ĉina kontinento li celis viziti Mongolion. Sed, li junie renkontis katastrofon en Pajntala (nuna Tongljaŭ en la nord-orienta regiono de Ĉinio) kaj lia revo fondi religian idealan mondon en Mongolio estis kvazaŭ interrompita.



Tamen, la majstro diris, akcentante ke lia vizito al Mongolio estis granda sukceso, per kio firmiĝis la fundamento de la spirita unueciĝo de la mondo.

En la sekvinta jaro 1924, maje, li fondis Religian Federacion de Mondo en Pekino, kies orienta centro situis en Kameoka, laŭ la instruo: “Ĉiuj religioj originas el la sama fonto”. Kaj en junio de la jaro 1925 li fondis UHA, kiu strebas realigi mondan pacon kaj feliĉon por ĉiu homo sur ĉi tiu planedo, sen diskriminacioj pro raso, nacieco, religio, kaj kredo.

En aŭgusto li sendis al la 17a





Universala Kongreso de Esperanto en Ĝenevo, Svislando, la misiiston de Oomoto, s-ro NIŜIMURA Koogecu kiu ĉirkaŭ 7 jaroj restis en eŭropo antaŭ la dua mondomilito, aparte fondinte Eŭropan Centron de UHA, kaj interligiĝis kun novspiritaj organizoj en Eŭropo.

Interkrampe, en 1925 la 13a Japana Esperanto-Kongreso okazis en Kioto, kie la majstro DEGUĈI Onisaburo faris sian prelegon kun la temo “Miaj spertoj en Mongolio kaj Esperanto” je plena humuro, kio vekis al la aŭskultantaro oftan eksplodon de ridoj kaj aplaŭdoj, malgraŭ ke li spertis mirakle eskapi de minaca pereco survoje al Mongolio.

Ĝis nun sinsekve okazis jubileaj eventoj de UHA en Mongolio

Antaŭ kvar jaroj memore al la 80 jara jubileo de post la vizito al Mongolio fare de la majstro DEGUĈI Onisaburo, la majstrino DEGUĈI Kurenai gvidis la grandan karavanon konsistitan el 177 oomotanoj, UHA/EPA-membroj, urbanoj kaj religiuloj.

En ĝi nia karavano kune plenumis la preĝon por la monda paco, kaj la komunan konsolan feston por forpasintaj animoj en ĉiuj tempoj kaj ĉiuj landoj en la preĝejeto Gungaachilin de la ĉefadministranta



templo Gandantegchinlen, kies estro estas la alte estimata Choijyamt.

Krome, nia karavano okazigis eventojn por la benefico de ne favorataj mongolaj geknaboj, invitante mongole konatan popularan kantistinon, Oyunna, kaj ankaŭ elstare modernajn muzikgrupojn al Kultura Paviliona Halo en Ulanbataro, nome de la Interflua Kulturkunveno inter Japanio kaj Mongolio.

Plie, en junio, 2005, kiam UHA havis 80 jaran datrevenon de sia fondiĝo, "Mongola Centro de UHA" nove registriĝis kiel la ne-registara organizo, tamen, oficiale rekonfirmata de Mongola registaro. Antaŭ tio okazis Internacia Kunveno de UHA en

Mongolio, kie ardis la diskutoj fare de 17 reprezentantoj de UHA-branĉoj, Barato, Nepalo, Srilanko kaj Honkongo kun la temo "Cele al la azia diverseco kaj realigo de azia unuiĝo (azia komunumo.)"

La 9-an de junio, 2008, gratulinde kompletiĝis Mongola Centra Domo de UHA, nomata "AZMON-Centro", kies figuro aspektas dignoplena kun ses etaĝoj sur la tero kaj unu etaĝo subtera, kolektiĝinte ĉirkaŭ 100 koncernatoj kaj gastoj el ambaŭ landoj.

Je 10:30 atm. solene celebriĝis la kompletigo de Mongola Centra Domo de UHA en ĝia oficejo forme de Oomota diservo sur la sesa etaĝo, kun la alesto de la majstrino DEGUĈI Kurenai. Poste, je 11:40 atm. la malferma ceremonio okazis antaŭ la vestiblo de la Domo kun la ĉeestoj de la majstrino DEGUĈI Kurenai, la prezidanto de UHA, s-ro



ŜIMAMOTO Kunihiko, la prezidanto de Mongola Centra Domo, d-ro Samdan TSEDENDAMBA, la vicprezidanto de MCD, s-ro Namdag BATTSEREG, la ĝenerala sekretario de UHA, s-ro Aleyksandr Batbayar, la direktoro de MCD, s-ro Barid ANKHBAYAR kaj la konsilanto de MCD kaj s-ro Osamu ABE, la konsiliano de MCD.

En la malferma ceremonio ili unuanime senvualigis la Esperantan ŝtonmonumenton ĉizitan per jenaj frazoj “Unu Dio, Unu Mondo, Unu Interlingvo”. Tiuj frazoj estis kopiitaj de la Esperanta ŝtonmonumento, konstruita memore al la kvardek jara jubileo de la fondiĝo de EPA sur la Esperanta placo en Kamoka. Fakte, ĝi estas devizo de UHA kaj Oomoto.

La prezidanto de la festkunveno diris tiel ke, per Esperanto montriĝas la vortoj simboligitaj de la spiriteco de UHA sur la ŝtonmonumento. “Tial, ni deziras atente



zorgi ĝin, por ke ĝi fariĝu la simbolo de AZMON-Centro.” Post tio la ĉeestantoj elkore aplaŭdis liajn vortojn kun ĝojoj.

Poste, la gratula ceremonio daŭris ĉirakaŭ 3 horoj kun enhavo riĉa, transirante al granda halo sur la unua etaĝo. Antaŭ la serio da gratulevento de UHA, je la 9a atm. okazis la senvualiga programero por la nomplato pendigata memore al la plenumita preĝo por la monda paco kaj la komuna konsola festo por forpasintaj animoj en ĉiuj tempoj kaj ĉiuj landoj en la 21a de junio, 2004.



Subtena agado por geknaboj kaj nomadoj

La sekvantan tagon, la 10an de junio, atm. la karavano vizitis la elementan lernejon en iu vilaĝo, situanta proksime de la ĉefurbo Ulanbatoro, kaj donacis kelkmil lernilojn al ĉiuj geknaboj kaj iliaj ĉeestantaj parencoj kiel la subtena agado de UHA de Mongolio, iniciatita de la majstrino DEGUĈI Kurenai antaŭ tri jaroj.

Krom tio, la karavano uzis 3 horojn per du mikrobusoj, vizitinte la domon de nomadoj, por ke ni ĉeestu en la inaŭguro de la unua silo de dombestoj kaj havis bonan okazon sperti la parton de nomadaj vivoj. Survoje, ni povis apreci pompajn figurojn de la sovaĝaj ĉevaloj, nomataj "Tahi" sur la montetoj.

Tiun nokton ni gastis ĉe la turistaj domoj sur ebena tero, kie ni povis apreci

mongolajn tradiciajn popularajn kantojn kaj sennombre etendiĝantajn stelojn milinde allogaj, inkluzive de Lakta Vojo en la profunde nokta ĉielo.

La 11an de junio, atm. la karavananoj multe ĝuis la naturon kaj kulturon pere de japana te-ceremonio, Mongola Sumoo (batalarto), kaj rajdado sur ĉevalo. Vespere, ni bonorde revenis al sia hotelo kaj refreŝigis nian laciĝon.

Tute 43 esperantistoj partoprenis el Japanio kaj Mongolio

La 12an de junio, tri grupoj de la karavano aparte agis tiel, ke la unua





partoprenis en la 2a Mongola Kongreso de Esperanto; la dua adorvizitis la japanan tombon por konsoli animojn de la forpasintaj soldatoj en Mongolio; la tria amike vizitis la fonduson de Oyunna kiu prizorgas multajn geknabojn senparencajn ekde pli ol dudek jaroj antaŭe.

La unua grupo, gvidita de s-ro KANAKOGI Tokio, la gvidanto de la karavano, la vicprezidanto de UHA, eksĉefdirektoro de EPA, atingis la Kultur-Edukan Universitaton de Mongolio kun 17 siaj membroj post 10 minuta veturado de la hotelo Chingiskhaan laŭ la akompano de s-ino D. Gereltogtokh, unu el la ĉeforganizantoj de la kongreso.

La Mongola Kongreso malfermiĝis je la 10a atm. en la kunvenĉambro sur la 4a etaĝo de la universitato. Ĝin partoprenis 24 el Mongolio kaj 19 el Japanio, inkluzive de s-ro Hori Yasuo, estrarano de UEA, kun lia edzino. Cetere, la aliĝkotizo estis



30 usonaj dolaroj.

Unue, s-ro Dorgh Balduuzijn deklaris la malfermon de la kongreso kaj poste prezentis nin, la reprezentantojn de la eksterlandaj partoprenantoj. Post la tralego de la mesaĝo sendita de la prezidanto de UEA, d-ro Probal Dasgupta, s-ino D. Gereltogtokh prelegis pri la kongresa temo “Ni efektivigu Esperantomovadon en Mongolio!”.

Laŭ tio Esperanto estis enkondukita en Mongolion komence de la 20a jarcento, kiam iu mongola budhano, lernis Esperanton en Turkio, kaj reveninte en sian landon li ekinstruis Esperanton al kelkaj mongolaj intelektuloj. Ankaŭ li elesperantigis literaturaĵojn de eksterlandaj verkistoj kaj regule publikigis ilin en tiutempaj revuoj. Tiamaniere li ekkonigis Esperanton en Mongolio

Tamen, tiutempe en Mongolio

komencis politike malfacila situacio kaj tial evoluiĝo de Esperanto preskaŭ ĉesis. La unua mongola esperantisto estis malliberigita pro falsa kulpigo kaj mortis en malliberejo. Liaj studentoj ankaŭ estis malliberigitaj.

Post la dua mondomilito en Mongolio ŝanĝiĝis, alivorte ekboniĝis politika kaj soci-ekonomia situacio kaj dank' al tio junaj mongolaj esperantistoj komencis aktiviĝi. De tiam ili daŭrigis tradukadon, verkis kaj kompilis lernolibron kaj vortaron. Nome, s-ro Rinĉen kreis la plej unuan liernolibron titolitan "Aŭtodidakta lernolibro de Esperanto por Mongollingvanoj" kaj "Esperanto-Mongola Vortaro" estis kompilita de s-ro Dagva, ktp.



Bone taksita

la fakkunsido de Oomoto

S-ro Hori faris prelegon pri Azia Movado de Esperanto post la dua Mondomilito. "Nun, 10 aziaj asocioj apartenas al UEA kaj ni esperas, ke Mongola Esperanto-Societo nove aliĝu al ĝi kiel la 11a landa organizo". Aŭdinte ĝin ĉiuj partoprenantoj aplaudis lin ĝoje.

Du jarojn poste, 2010, la 6a Azia Kongreso de Esperanto okazos en Ulanbatoro, al kio li promesis akompani almenaŭ 50 japanajn esperantistojn krom oomota karavano.

Post la ripozo, je la 11a atm. komenciĝis la fakkunsido de Oomoto ĝis la 1a ptm. kun la temo "Oomoto kaj Universala Homama Asocio", en kiu s-ro Jamazaki Micuo kaj s-ino Usami Hideko prezidis la kunsidon kiel jene:



Malferma deklaro: Joŝida Nobuko

Malferma saluto: Kanakogi Tokio

Ĉinkon-meditado kun akompano de
Jakumo-kotoo, dukorda plukinstrumento:

Kimura Kacuĵa, Ŝimomukai Ajako

Prezentado de la videofilmo “Paŝoj de
Oomoto”

Prelego pri “Oomoto kaj Universala
Homama Asocio(UHA)”: Agou Takaŝi

Parolo kun la temo “Mi, Esperanto kaj
Oomoto”: Enkhee Chimedtseren, Kimura
Kacuĵa

Ŝimajo “Haŝitomi” : Igaraŝi Secu,
Katagiri Ĉijuri

Teceremonio: Tarui Acuko, Arima
Masako, Usami Hideko, Joŝida Nobuko,
Igaraŝi Secu, Katagiri Ĉijuri, Kamijama
Saho, Agou Takaŝi

Ĥoro “Oro”: Ĉiuj ĉeestantoj

Ferma saluto: Kamijama Saho

Ferma deklaro: Ŝimomukai Ajako

Estis tre impresige, ke ni servis al ĉiu
partoprenanto tason da pulvora teo en



trankvila atmosfero.

Cetere, la akcepto de la kongreso komenciĝis je la 6a ptm. en la 11a de junio kaj daŭris jenaj programeroj ĝis je la 6a ptm. en la 12a de junio: ĝenerala kunveno de mongola Esperanto-societo, malfermo, kongresa temo, prelegoj “Per Esperanto Florigu Amikajn Florojn en Azio” “Budhanoj aktivas en Esperanto” “Esperanto estas Internacia Lingvo” “Verduloj por Ekologio”, fakkunsidoj “Esperantismo kaj Homaranismo” “La Japana Blua Ĉielo” “Japana paperfaldarto(origami)” “Aktivigo de Esperanto-instruado” “Utiligo de Esperanto” “Konversacia rondo”.

Post la tagmanĝo la karavano revenis al sia hotelo, ricevante de la mongolaj kongresanoj amikecplenajn adiaŭojn kaj aranĝis siajn pakaĝojn por flugi al Japanio. Vespere, la meteologa stato okupis la flughavenon tre malbona, kaj nia aviadilo





prokrastis unu tagon por atingi al la Internacia flughaveno Kansai.

Kvankam la karavano estis devigita resti 12 horojn en la flughaveno Kimpo, Koreio kaj tio sentigis al ni ne-facile forviŝeblan laciĝon, tamen ĝi estis nekredeble bone forprenita ekde la momento, kiam nia spirita gvidantino, la majstrino DEGUĈI Kurenai kiu tri tagojn pli frue revenis Japanion ol ni, tre varme kaj amplene bonvenigis nin, eĉ preninte nian individuan manon unu post la alia kun favoraj ridetoj.

Ni, oomotanaj esperantistoj estas



jam destinitaj sukcesigi la 6an Azian Kongreson de Esperanto en Ulanbatoro, de la 19a ĝis la 25a de junio en 2010, tiom pli firmigante amikecan rilaton kun Azmon-Centro de UHA kaj Mongola Esperanto-Societo, kaj ĉar la arda revo de la majstro DEGUĈI Onisaburo aŭtentike realiĝos pere de la agado de AZMON-Centro de UHA.



Ne ebla? Mi ebligas.

— En la fakkunsido de Oomoto, kadre de la 93a UK—

Etsuo Miyoshi
Honora membro de EEU,
Direktoro de EPA

Ne eblaĵo (1)

Ekde antaŭ 15 jaroj, ni gravigis la realigon de novaj produktoj, ĉar la merkato de vintraj gantoj duoniĝis pro tervarmiĝo, hejtiloj kaj aŭtaj civilizoj. Mi ekpensis pri bastonvalizoj kiuj havas 4 radojn kaj apogas korpon per eltirebla tenilo. Dum kelkdek jaroj mi vendadis gantojn tra la mondo, kaj en flughavenoj kaj stacidomoj, mi ne povis forgesi “magian valizon”.

Mi ekexploris ĝin en 1995, se oni apogas sian korpon ĝi tuj falas, se la tenilo ne estas super la valizcentro. Aŭtune en 1996 kiam ni esploradis, mi frumatene en Shanghaja hotelo ricevis inspiron pri “kurbigu la tubon”. Jen la fina produkto, “Walkin’ Bag”. La tubo kurbiĝas per 3-metra radiuso, ĝi ebligas komforte promeni kaj apogas vin kiel moviĝanta apogrelo.

Mi ekfabrikis ĝin en 1997 sed profunde kaj longe ĉagreniĝis pri vendado, la estraraj kunsidoj postuladis retiron. Post kelkjara sufero, mi decidis ke ĉiujn kontraŭantojn mi maldungos kaj promocios iliajn subulojn. Estas mia krizsava ideo, ke mi mem aperos sur la

afiŝetoj. Antaŭe ni klarigis ke “ĝi apogas vian korpon, per 1/6-o da energio vi kunportas aĵojn” ktp, sed, klientoj ne kredis tion.

Do, mi enmetis mian foton kaj jenan klarigon:

“100-foje ĉirkaŭirante la mondon, mi pensadis pri korpapoga valizo. Vi povas marŝi apogante vian korpon komforte. Ganta kompanio Swany, Etsuo Miyoshi”. Aldoninte tion, ni ekvendis bone. Mi ne bezonis instigi maldungon. Por ke ĝi ne estu “varo por maljunuloj”, la estraro rekomendis ke mi nigrigu duonblankan hararon. Mi estas 68-jaraĝa, sed aspektas pli juna. Ekvendiĝis valizoj, kaj sukcesis ankaŭ mia rejuniĝo.

Ni vendas 120,000 valizojn je 10 milionoj da eŭroj jare, 20% de nia vendado, sed iam valizvendado altiĝos pli ol gantoj. Ĉiujare ni ricevas ĉ. 5,000 enketilojn, kiuj demandas “bonvole fabriku mansakon por kosmetiko, monujo, poŝtelefono ktp”. Mi sentis ke tre malgranda aldono kaŭzos bastonan revolucion. Mansakan Walkin’ Bag ni ekvendos venontjare. “Ĝi estas duono de ĉi tiu. Antaŭ 3 jaroj ni ekvendis Walkin’ Bag en Usono, iam vendos ankaŭ en EU-landoj kaj Ĉinio.

Ne-eblo (2)

Mi eksciiis pri E-o, kiam mi legis "Plezura vojaĝo en E-lando" verkitan de s-ro Kyotaro Deguĉi, konsilanto de Oomoto kaj nepo de majstro Onisaburo Deguĉi. Tiam mi diligente lernadis la anglan, tamen mi raviĝis pri egaleco, facileco kaj homa emancipiĝo fare de E-o, sed mi nur decidis lerni ĝin iam.

Post 30-jara dormado, kiam mi estis 55 jaraĝa, mi eklernis E-on. La decido ankaŭ estis mia vivdefio por popularigi E-on. La lernado estis ege malfacila ĉar mi devas prezidi 1,600 kompanianojn. Mi laboras 2/3-e, lernadas trione, mi ne vidis eĉ TV-on dum 13 jaroj kaj investis 10,000 horojn por lerni E-on.

Antaŭ 20 jaroj, la prezidanto de transport-kompanio "Jamato" reklamis en Japana Ekonomia Ĵurnalo tutpaĝe. La anonco diskutigis pri transporta politiko publike, poste la registaro komplete liberigis. Rezulte, la tarifoj je 30% malaltiĝis kaj libertempo duoniĝis, la japana ekonomio gajnis fortan konkurencon. Do, mi decidis kaj veti mian tutan energion kaj flamiĝi la lingvan revolucion per tutpaĝaj anoncoj.

Per la pensia mono kaj kunhelpo de bofilo, en 2002 en Danlando "Berlingske Tildende" mi unue aperigis tutpaĝan anoncon. Kompreneble, kunhelpe de landaj asocioj, eksprez. de UEA d-ro Corsetti kaj prez. de EEU d-ro O'Riain.

Sekve, "European Voice" en Belgio, "La Repubblica" en Italio, "Le Monde" en Francio, kaj "Die Zeit" en Germanio,

kaj 8 mezeŭropaj landoj. Tiam mia mono elĉerpiĝis. En 2004, mi povis daŭrigi la kampanjon per profito de "Walkin' Bag". Ĉar la estraranoj de Swany decidis ke mi rajtas uzi 10%-n de la profito. Sub kondiĉo de forcedo de miaj patentaj rajtoj al kompanio.

Post 15 anoncoj, d-ro O'Riain sugestis ke mi daŭrigu nur en Francio, ĉar ili tenas en mano la ŝlosilon por lingv-revolucio.

Se ili vekigiĝos pri diskriminacio kaj maljusteco per dominado de la angla en EU, ankaŭ Germanoj ekscios la enorman lingvan problemon. Tial mi koncentriĝos al "Le Monde" dum kelkaj jaroj.

Mia frato laboris en Tokia TV-kompanio dum 40 jaroj kiel reklam-fakulo. Li forte sugestis ke mi mem devas sursceniĝi en la ĵurnalo, alie ne sukcesos. Sed ne ĉiuj konsentis la ideon. Mi negociis dum 8 monatoj, sed ne atingis interkonsenton. Do, mi ĉagreniĝadis monatojn. Finfine, mi decidis kaj flugis al d-ro O'Riain kiu laboras kiel lingva fakulo ĉe la EU-komisiono. En la 15a de aprilo mi flugis al Bruselo kaj sekvanta matene revenis hejmen. Mi diskutis esencajn aferojn kun li dum vespermanĝo, kaj akiris lian konsenton. Iom poste, UFE pene tradukis mian tekston al la franca, kaj mi aperigis la 9an de majo, en Eŭropa Tago. Ĉi tiu estas la anonco. Granda titolo estas "EU-anoj pagas 17 miliardojn al Britio jare por lernado de la angla". Sekve, prelego de prof. Reinhard Selten en la EU parlamentejo en la 9a de majo lastjare.

"Necesas trovi solvon de la Eŭropa lingva problemo. Dominado de unu nacia

lingvo ne povas esti la respondo...Facile lernebla E-o taŭgas kiel neŭtrala solvo”.

Plie mi prezentis 2 E-istajn EU parlamentaninojn, kaj ankaŭ milojn da denaskaj E-infanoj. Jen mi petas al francoj “stariĝi kaj levi la voĉon. Vi francoj povas ŝanĝi la mondan lingvon”, kun mia biografio kaj foto. Ankaŭ troviĝas TTT-paĝa adreso de mia prelego dum IJK en Zakopane. Mi 10-foje aperigos la saman enhavon por vekigi amaskomunikilojn.

Se ili ekmoviĝos, mi ŝanĝos lokon de anonco al Germanio. Sed, amaso da germanaj junuloj ne volas aŭdi eĉ la nomon “E-o”, ĉar ili nur kredas ke ili jam parolas bonan anglan. Sed, bonvole pripensu ke la iniciatintoj kaj gepatroj de Eŭropa Unio estis Francio kaj Germanio. Kelkmil homoj jam legis mian Zakopane prelegon. Mi miris ke anonco de “Le Monde” traflugis al Germanio, ĵurnalistino de “STERN” plej fama gazeto intervjuos min. Kaj en Francio ĉ. 10-foje aperis pri E-o en televido, ĵurnaloj kaj gazetoj dum aprilo kaj marto.

Se Francio kaj Germanio vekigiĝos, la ceteraj 25 landoj sekvos ilin laŭ E-istaj gravuloj. Ekde nun mi reklamados kaj ordigas diversajn opiniojn de prez. de

UEA, d-ro Dasgupta, EEU- gravuloj, UFE-anoj kaj Germanaj E-Asocianoj.

Ĉiumatene mi preĝas ke realiĝu la slogano de Oomoto “Unu Dio, Unu Mondo kaj Unu Interlingvo”. La 5-a spirita gvidantino, la majstrino Kurenai Deguĉi deklaris multfoje “Certe E-o fariĝos komuna lingvo en la mondo”. Kaj la edzo de la 3-a spirita gvidantino, la majstro Hidemaru Deguĉi, stimulis ke “se oni vetas vivriske, oni ricevos ajnan forton”, tio spronas min al defio de la lingva revolucio.

Mi petas al vi ke persvadu kelkajn novajn homojn, kaj membrigu ilin al UEA aŭ TEJO. Bonvole alvoku al viaj najbaroj, geamikoj kaj familianoj, kaj ankaŭ eduku viajn heredantojn. Ĉar nia grandega problemo estas malmultiĝo de niaj membroj. Mi elkore petas vin, multigu niajn membrojn.

Mi persvadadis miajn 3 filinojn, finfine pliaĝa filino Ajako eklernis E-on antaŭ 6 jaroj. “Stariĝu Ajako kaj salutu al ĉiuj.” Mi petas vian zorgon al ŝi. Koregan dankon.

La naskiĝo de EU estas la unua kaj lasta ŝanco de nia historio. Se Eŭropa Unio ŝanĝiĝos, tio influos al la mondo.

Vous payez 17 milliards d'euros chaque année à l'Angleterre !

20000 jeunes européens étudient en Angleterre, on invite des enseignants britanniques, etc. Voir le rapport Gdn. de l'Université de Genève, pour le Haut Conseil de l'Éducation de l'École. En 2002, le gouvernement britannique a déclaré que : « Les enfants anglais peuvent arrêter l'étude des langues étrangères dès l'âge de 14 ans. »

Voit le résumé de l'ouvrage *L'Europe de nos anglais* rédigé par le linguiste britannique R. Phillipson sur <http://europo.es/index.php?art=2&art2=34>.

« Il faut trouver une solution au problème linguistique en Europe. La domination d'une langue nationale ne peut être la réponse... Une langue auxiliaire facile à apprendre comme l'espéranto est une solution neutre. »

(Déclaration du Prof. Reinhold Schen, prix Nobel d'économie, devant le Parlement européen le 9 mai 2007)



De gauche à droite: M. Schen, M. Schen, M. Schen. Ce sont des enseignants britanniques qui ont été invités à donner des conférences aux étudiants européens pendant l'expérience espéranto, en 2002. Ils ont tous trois accepté volontiers, montrant la vraie solidarité et l'espérance.

En avril 2004, 43% des parlementaires européens ont voté en faveur de l'espéranto.



Emma Myrén, présidente parlementaire européenne de l'espéranto.



Marlene Lindahl, membre du Parlement européen de l'espéranto.

« Une à propos de Zamenhof et l'homme qui a créé Babel »

www.esperanto-que.info/fr/le1021.html

Photo: Emma Myrén, Emma Myrén, Emma Myrén

C'est 10 fois plus vite que l'anglais que l'on peut apprendre l'espéranto, proposé par le Dr Zamenhof en 1887. C'est avec plaisir que caractérisé par son orthographe phonétique, l'accent tonique sur l'avant-dernière syllabe et une grammaire basée sur seulement 16 règles (sauf exceptions). Grâce à des affixes, on peut créer de nouveaux mots. Exemple avec la Déclaration des droits de l'Homme (art.2) :

« *Chuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en la Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen ĉiuj diferencoj. Ĉu ĉiuj rajtoj, hakuloj, sekso, lingvo, religio, politiko aŭ aliaj opinioj, naciaj aŭ sociaj devenoj, posedaĵoj, natuĝo aŭ aliaj stato.* »



Professeur Reinhold Schen



Vous, Français, pouvez choisir la justice linguistique !

Annonces : Bruno Myrén, Président de la société de valeurs "Swany"

À 23 ans, initié à une idéologie sentimentale et peut-être à cause de ma jeune amoureuse de polynésie, j'ai été très affecté et mes parents m'ont conseillé une retraite spirituelle pendant laquelle j'ai fini par retrouver le goût de la vie. C'est alors que j'ai appris l'existence de l'espéranto et me suis enthousiasmé pour les valeurs qui le sous-tendent. Avant brisé la société familiale après avoir étudié le commerce et l'anglais, j'ai commencé à sillonner le monde, mais en me laissant inspirer à la sortie des langues. Ce n'est que plus tard que j'ai effectivement appris l'espéranto avec une grande facilité, ce qui a marqué un tournant dans ma vie. Les différents peuples du village planétaire partent des langues différentes et les codes postaux ont les sentiments ne peuvent être communiqués. J'ai pensé que le seul moyen de réaliser les idéaux de paix et de fraternité de Zamenhof serait de faire appel à vos cœurs. Le moment est venu pour l'humanité qui souffre de l'Épigramme de l'anglais de faire entendre sa voix. L'Europe et spécialement vous les Français qui tiennent les clés de la diffusion de l'Espéranto.

Unuaj impresoj pri Japanujo

MATHIAS DALMOSE

DANUJO

Ĉijaran julion mi pasigis en la belando, Japanujo. Jen mi donas al vi kelkajn el miaj jam digestitaj unuaj impresoj de tiu mirindejo, sed unue iom mi rakontu pri miaj kialoj por viziti Japanujon.

Antaŭ jaro kaj duona mi ekstudis japanologion en la universitato de Kopenhago (Danujo), studo kiu unuaparte temas pri la japana lingvo, kaj ankaŭ pri la japana historio, kulturo kaj pli ĝenerale, superrigarde pri la “homaj sciencoj” (ekz. historio, antropologio, arto, lingvistiko ktp.). Mi selektis la studon ĉefe pro la lingva parto, ĉar lerninte Esperanton mi ekinteresiĝis pri multaj flankoj de la lingva fenomeno. Sed tuj ekstudinte mi ekkonsciis, kiel jam supozite laŭ jama fascineto, ke ne nur la lingvo, sed ankaŭ multflanke la tutaj kulturo kaj popolo de Japanujo estas bonkurioze fascina afero.

Mi surtretis japanan grundon je la unua fojo la 2an de julio 2008, kaj tuj frapis min la humida varmego – jam oni avertis min pri tiu varmego de la japana somero, sed mi neniam sentis ion similan, kaj do ne kapablis kompreni la vortojn “humida varmego” antaŭ

ol mem sperti tian. Feliĉe mi rapide al kutimiĝis al la klimato, kaj tute ne suferis. Kontraŭe, tiu afero ŝajne ĉiam donas eblecon bableti: Acui desune. Ee, acui, acui!

Alveninte al la flughaveno Kansai mi tuj iris al Kioto, kaj de tie al Kameoka, kie min akceptis la centro de Oomoto, al kies anoj mi kore dankas pro belaj spertoj kaj eksterordinara afableco – nek mi forgesu danki pro la tre bongusta kaj saniga manĝaĵo, kiun por mi preparis, speciale pro mia vegetara prefero, la afablaj kuiristinoj. Dankon!

Montriĝis ke la centro de Oomoto estas loko kie mi povas trankvile al kutimiĝi al la japana klimato, babilante kun afablaj homoj kaj promenante en la belaj arbaroj, ĝardenoj kaj laŭ la ĉirkaŭaj kampoj. Ĉe Oomoto mi spertis je la unua fojo la japanan ĉiutagan kulturon, ekz. la manĝaĵon kaj la banejon, kiuj ambaŭ estas aferoj tre ŝatataj de mi. La tradicio pri la banado en varmaj fontoj estas tre ĝuinda kaj trankviliga, kaj unu el la pluraj aferoj kiuj mankas al mi en Danujo.

Post iom pli ol semajno ĉe Oomoto mi komencis mian vojaĝon tra Japanujo

ĝis Sapporo en Hokkajdo kaj poste reen ĝis Hakata en Kjushu. Survoje mi spertis multajn interesaĵojn kaj belaĵojn, interalie en Kamakura, kie mi restis kelkajn tagojn ĝuante la urbetan etoson kaj la belajn templojn. Precipe impresis min la granda budho, kies ekziston mi ekkonsciis antaŭ la vojaĝo, kiam jam decidis tiun sperti. En Sapporo mi ĝuis gastiĝo ĉe Esperanto-societo en Hokkajdo, kaj poste en Tomakomai mi gastiĝis ĉe tre bonkora Oomotana familio, kun kiu mi spertis belajn vidindaĵojn kaj ĝuindan babiladon. Mi kore dankemas al ĉiuj tiuj afabluloj.

Krome mi vizitis amikon en Jokohamo kaj amikinojn en Osaka kaj Hiroshima, kaj pasigis tre bonan tempon kun ili kaj kelkaj el ties familianoj kaj amikoj. Kun mia amiko de Jokohamo mi spertis la fascinantan urbegan vivon de Tokio.

Multe de la tempo mi tamen vojaĝis sola, ĉar tiel mi povas sperti lokojn kaj okazaĵojn laŭ mia propra impresfluo, kaj tiel mi povas defii mian japanlingvan kapablon senhelpe de Esperanto kaj japanaj konatuloj. Mi feliĉe trovis ke mia japana lingvokapablo, kvankam ankoraŭ tre baza, helpe de la afabla komprenemo de la japanoj, fakte jam povas helpi min en pli malpli ĉiuj bezonataj komunikaj situacioj. Nur unu fojon biletkontrolisto koleretiĝis al mi, ĉar mi sidis en malĝusta trajnvagono; sed li do poste komprenis mian pardonpeton. Mi do

tuj lernis distingi inter la simboloj por libera vagono kaj vagono kie postulatas mendita sidloko. Entute mi bone lernis uzi ĉiujn tipojn da trajnoj kaj aliaj transportiloj, ĉar mi vojaĝis preskaŭ ĉiutage dum pli ol tri semajnoj tra tuta Japanujo.

En la grandegaj stacidomoj ekz. en Tokio min fascinis la homa fluo - estas tiom da homoj, kiuj rapidas al siaj diversaj celoj, kaj tamen ŝajne ĉiuj evitas obstakli la vojon de aliaj. Mi havas la imagon ke japanoj estas pli sentemaj ol aliaj al mi konataj popoloj, sed, malgraŭ tiu sentemo, ili sukcesas konservi privatan sferon en kiu ili troviĝas kvazaŭ nerimarkante la aliajn personojn. Mi dubas ke japanoj mem rimarkas tion, sed en plenplenaj trajnoj mi ĉiam miris pri la trankvileco elradianta de la homoj. Mirante pri tio, mi eksentis rekonon de tiu trankvileco en mi mem, kaj ekkonsciis ke mia spirita celo pri la vojaĝo al Japanujo, kaj eble entute pri la studo de la kulturo, estas trovi tiun trankvilecon en mi mem.

Entute, mi tre kontentas pri mia unua vizito al Japanujo, kie al mi plurfoje konfirmiĝis la multaj rakontoj pri Japanujo kiel mirinda, kvazaŭ fabeleca lando. Mi tiel tre esperas iam povi reveni al Japanujo kaj tie daŭrigi la lernadon de la lingvo kaj kulturo.

Vivo de Oomoto-fondintoj

Vivo de Deguči Nao kaj Deguči Onisaburo

1

Ito Eizo, tradukis Huĝimoto Tacuo

Antaŭparolo

Oomoto venis en la mondon en Ajabe, gubernio Kioto, novjare de la luna kalendaro de la dudek kvina jaro de Meĵi, per la “ekposedo de Dio” je la fondintino Deguči Nao. Tio estis drameca naskiĝo, simila al granda erupcio sen antaŭsigno de vulkano.

Iom pli ol cent jarojn de tiam, Oomoto kreskis teksante ondegajn kaj zigzagajn. Tra la tri eraoj Meĵi, Tajŝoŭ kaj Ŝoŭŭa, Oomoto faris paŝadon en la paŝoj de Japanujo en la moderna tempo, kiu, laŭdire, plenumis plej drastan ŝanĝon en la homara historio, aŭ antaŭiranta tion.

Severa, ekstreme rekta, funkcia tarpe, laboranta fajre; la akva spirito estas patrinodio, ekstrema humana, ekstreme amema, funkcia vefte, laboranta akve. Per harmonio de fajro kaj akvo ĉio ekvivas, tiel per la varpo kaj vefto kune teksiĝas brokato.

Tiel la ideala socio, kiu estas la granda celo de Dio, la mondo de Miroku (majtrejo)

realiĝos, oni kredas tion.

Ankoraŭ unu alia kvalito de Oomoto estas, ke ĝi ne estas eklezio farita de homa forto, sed ke ĝi estas naskita de dia plano; ke ĝi estas organizaĵo manipulita de la manoj de Dio. La vorto “dia plano” ne estas sufiĉe familiara por la ĝenerala publiko; ĝi signifas principon aŭ strukturon por regi la subĉielon: tiu ĉi mondo estas pri strukturita, movata, direktata al kompletiĝo per la dia plano, tiel oni instruas ĉe Oomoto. Kaj Oomoto mem estas tute io super la homa kalkulo, el la vidpunkto de la eksesto de ties historio.

La volo de Dio estis intensa kaj urĝa. La moviĝo de Oomoto ricevis la koron de Nao, estis gvidita de Onisaburo, surprizis la popolanojn, kaj foje tremkuis la socion. En la deka jaro de Tajŝoŭ okazis la unua Oomoto-afero; en la deka jaro de Ŝoŭŭa okazis la dua Oomoto-afero, kaj laŭ la formo Oomoto estis pereigita. Sed ankaŭ la granda persekuto, malofta en la religia historio, ne povis devigi la volon de Dio:

Oomoto nun daŭrigas la kreskon vigle viva.

La vivo de Nao estis, en paŭperismo, honeste pura, ekstreme severa kaj ekstreme rekta. Tiu de Onisaburo estis, en multoblaj peripetioj, senarfika, ekstreme humana kaj ekstreme amemaj: ĝi estis nenio krom ami ĉion.

La kredantoj ame sopiras Naon kiel la fondintinon, kiu pioniris la bazon de la mondsavo, kaj Onisaburon ili laŭdas esti majstro, kiu elaĉetas ĉies pekojn, kaj fidas ke li estas savanto de la homaro. Ili estas ankaŭ ekstreme puraj kun la koro de Dio, respektive plenaj de homeca ĉarmo; tiajn Naon kaj Onisaburon mi deziras en ĉi verketo priskribi kiel eble klare kaj sincere.

Tio estas por mi, unu kredanto, io timiga, precipe prirakonto sen respektaj titoloj, sen estimaj esprimoj, postulas kuraĝon; tamen, petita prezenti “la gefondintojn laŭ la interna vidpunkto”, mi strebos priskribi, laŭ la historiaj faktoj, sen ornamo.

Vundita de persekutiĝoj pro religia kredo, Oomoto tamen faris tion nutraĵo kaj vivas fortike; ĝi donis profundan instigon al la homoj kaj la mondo; mi deziras skizi la personecojn, ideojn kaj agojn de la paro da fondintoj de Oomoto, kiuj naskis la aroman kulturon.

Se tiu ĉi modesta libro povus alporti strion da lumo al la ĥaose labirinta nuntempa socio, mi ĝojus.

La Unua Ĉapitro

El la vivo de la fondintino

Novjaron (lunan) en la 25-a jaro de Meĵi (1892).

Ĉiuj mondoj samtempe disvolviĝas kiel umefloroj. Jen venis la tempo de Dio Uŝitora. Nun realiĝas Dia mondo, kiun Mi malfermis umeflore por daŭrigi pinkolore. La nuna mondo estas besta mondo, plena je nur diabloj, en kiu plifortaj perforte regas malplifortajn. Ankaŭ Japanio fariĝas besta. Se la mondo daŭros en la nuna stato, baldaŭ ĝi pereos. Pro tio Mi aperis por plenumi la malkonstruon kaj rekonstruon de ĉiuj mondoj. Ĉiu do sin pretigu. Ĉi tiun mondon Mi ĝisfunde renovigos. Plenuminte la grandajn lavadon kaj purigadon de la tri mondoj materia, obskura, kaj Dia, Mi pace regos la mondon kiel Dian, kiu daŭros por ĉiuj generacioj. Sciu ke la vortoj de Dio realiĝos kun nenia eraro, sen eĉ harlarĝo da diferenco. Se ne, Dio ne ekzistas en ĉi tiu mondo.

La meĉa fajro
Estingiĝas monde nun;
Mi prisopiras
Semon, kiu subtenas
Tian mondon prosperi.

Malvarma mondo:
Sub forta uragano
Plene noktiĝas;

Mi atende atendas
Baldaŭan sunleviĝon.

Diposedo

La nova registaro, naskita de Meĵi-restaŭro luktis kun modernigo de Japanujo, kaj rapidis por starigo de la unuigita regno kaj prifaro de la japana kapitalismo. Tio estis ligita al la ŝovinisma naciismo, militismo kaj ŝtata ŝintoismo.

La dudek kvina jaro de Meĵi estis tia tempo, kiam la vojlinio de tia japana kapitalismo efektive faris la paŝon antaŭen kaj nacie kaj internacie kun milita forto en la fono. Kaj, ankaŭ al Ajabe, malgranda subkastela urbo en Tanba, tiu fluo de la ŝanĝo torente alpuŝiĝis.

Deguĉi Nao renkontis sian kvindek-sepjariĝon novjare laŭ la luna kalendaro en la dudek kvina jaro de Meĵi. Nokte de tiu tago Nao estis subite kovrita de aromaodoro, kaj ŝi iris invitita al mirinda mondo de fantazio. Nao staris en senkompare blindiga pompeco, en belega palaco; dum ŝi paŝis en tiu dietosa pitoreskejo, ŝi renkontiĝis kun respektinde noblaj dioj. Tiaj disonĝoj daŭris ĉiunokte, kaj ŝi iris kondukita al la mondo de dispirito. Tio estis io aŭgura al la diposedo.

Profunde en la nokto de la kvina tago, laŭ la kristana (suna) kalendaro, en la tria de februaro, ĝuste en Secubuno, la infanoj de Nao, Rjoŭ dek du jara kaj Sumi (poste la dua spirita gvidantino) dek jara atestis sian patrinon ekskluzive verŝadi al si akvon ĉe la puto sub la froste malvarma

nokta ĉielo. Nao, rekonante la duopon fiksitajn stari tie, instigis “frue kuŝiĝu” per la kutima, bele mola voĉo, kvazaŭ svinganta sonorileton.

La diposedo je Deguĉi Nao ja komenciĝis en tiu ĉi nokto. Estante en la stato de diposedo, Nao sentis sian korpon tre peza, pleniĝanta de forto. Al Nao varmiĝis la frunto, rektiĝis la sinteno. Baldaŭ la korpo lante skuetiĝas kun eta kurbiĝo dorsen. La genuoj alterne moviĝas supren-malsupren kun sono. La mentono kuntiriĝas suben, la okuloj ekbrilas. Kaj, el la fundo de la abdomeno eliras granda voĉo plena de majesteco. La voĉo estas ekster la konscio de Nao, kaj ŝi ne povis subpremi la voĉon kun la dentoj firme kunpremitaj. Kaj al tio ankoraŭ, la voĉo estis kio, la vira!

Kiam finiĝis la diposedo dum iom da tempo, ŝi sentis nenomeblan lacecon dum kelka tempo kvazaŭ la animo tute ellasis ŝin. Tiu ĉi diposedo okazis sendistinge kaj tage kaj nokte, kaj dum dek tri tagoj de la tria de februaro laŭ la nova (suna) kalendaro, ĝi estis tiel intensa, ke ŝi ja povis nek manĝi, nek endormiĝi.

Nao estis ĉagrenita, kiel pensi pri la Dio, kiu subite ekposedis ŝin, kaj provis forskui ĝin. Kiam ŝi vidis, ke tio ne eblas, ŝi povis nur rekte negoci kun la Dio ŝin ekposedinta.

Nao pridemandis jene la misteran objekton: “Kio ja povas esti lia moŝto? Bonvolu vin prezenti detale.”

Al tiu demando eĥe leviĝas en ŝi io grave peza kaj gema, kune kun aroma, spirita aero el la fundo de la malsupra

ventro.

“Tiu ĉi moŝto ja estas Dio Uŝitora.”

Tamen per la vira voĉo. La gemo tremis je la regiono de brusto, kaj okazis forta impulso preskaŭ spirhaltiga, kaj samtempe nature moviĝis la ĉirkaŭo de la buŝo. Sed bele delikata voĉo sonoras en la oreloj de Nao. La maltrankvilo de Nao kreskis.

“Volu retiriĝi el tiu ĉi korpo,” ŝi plendis. Ĉu ŝia peto estis aŭdita, aŭ ne aŭdita, tamen la Dio komencis stimuli Naon.:

“Tiu ĉi moŝto nun ekos gardi cian korpon.” Flanke de la Dio, oni sentis nuran urĝecon. Tiaj demandoj kaj respondoj ŝajnis al la apudestantoj ŝia propra dialogo. Sed, ĉe atenta priaŭskulto, la vortoj de Nao sonis en la kutima modesta voĉo, kaj la voĉo de la Dio sonis en nepre forta vira voĉo. La Dio kriis laŭtavoĉe:

“.....Tenri, Konkoŭ, Kurozumi, Mjoŭrej estis antaŭkurantoj; definitive aperas Dio Uŝitora, kaj faros la rekonstruon de la mondo. Ke estos la rekonstruo de la mondo, estas komprenata de ĉiu dikolono, sed kiel okazos la rekonstruo, tio ne estas komprenata. Ĝis la naŭdek naŭ procentoj ĝi estas sciigita, tamen la unuprocenta kvintesenco restas nekonata.”

Li krias ankaŭ jene:

“Selektante kristalanimon, mi faros animprovon. Nun venis la absolute definitiva mondo. Popolanoj de la mondo volu fari korreformon; la mondo ja ŝanĝiĝos.....”

Tiel, abrupte sur la tero de Ajabe en Tanba aperis la Dio, kiu promesas realigi la dian mondon de Miroku, kiu malkonstruos kaj rekonstruos la trimil mondojn — reala, spirita kaj dia —.

Pro tio, ke ni tuj de la kapo eniris en la mondon de mistero, la leganto povus esti iom konfuzita. Tie ĉi ni ŝatus iom ekspliki pri la jam prezentita fenomeno de la “diposedo”. Tio estas plej grava elemento por kompreni la enhavon de tiu ĉi verketo, kaj sen tio, ni ne povus facile iri antaŭen. Diposedo estas unu speco de la vulgare nomata “Kamigakari”, la diposedo estas tamen origine tute for de la imago, kiun havas la vorto “Kamigakari”. Ĉe la esprimo “Kamigakari” oni emus ĝin kompreni kiel egale malaltnivelon, sed interne estas granda diferenco. Deguĉi Onisaburo, nia kunfondinto de Oomoto, kiu venos poste sur la scenejon, priskribas jene en la verkego “Rakontoj el la spirita mondo” el okdek unu volumoj:

“.....oni, nomas la diposedo la staton, kiam la homa spirito ricevas la internan fluon de dieco direkte kaj rekte al la granda pradio aŭ mastrodio (aŭ nomata diego) kaj agordiĝas. La diposedo signifas reagordiĝi je la dieco de diego, kiu estas la fonto de nia spirito. Tial la diposedito estas misianto de la vera stato de la spirita mondo, plej necesa por profeto, per rekta ricevo de la interna fluo de diego.”

(La kvardek oka volumo: la unua ĉapitro)

Deguĉi Onisaburo plue analizis tion, ke, kiel la posta ŝtupo de la “diposedo” estas “Sinken”; ankoraŭ pli sube estas

“Ŝinpjoŭ”. Kaj ĉiujn tri oni nomas vulgare “diposedo”, sed la diferenco inter ĉiu el ili estas senkompare granda.

“Ŝinpjoŭ” signifas insidon de la spirito, kiu faras mensogon plenan de memamo kaj mondamo, t.n. malica spirito, malbona spirito. Tiu insidanta spirito mem kredas esti nobla dio, kaj la insidita homo kredas, ke ĝi estas vera dio, do estas bedaŭrinda afero. Tial tiu ĉi insidanta spirito estas aplomba, eĉ se ĝi multe erarigas la ĝeneralan publikon.

La kazo de la fondintino de Oomoto estis kompreneble la plej respektinda diposedo.

De antaŭe, pri fondintino de Oomoto scienculoj, kritikistoj aŭ tiaj personoj redaktas en la formo de biografio aŭ revuo kaj prezentas kun bonvolo al la mondo; ĉiufoje, kiam mi privilegas la verkon, mi admiras ĝian esprimon kaj interpreton pli kleriĝante, tamen, kiel unu el la kredantoj, mi renkontiĝas ĉiam kaj nepre kun unu embarasa loko. Tio koncernas, kun unu-du esceptoj, la komprenon pri la diposedo de multaj revuverkintoj.

Unu diras, ke, rezulte de multoblaj diversaj suferoj, tio estis spirita ago nesubpremebla de la matrono Nao povanta nenien eskapi; alia rigardas, ke tio estis mortoriska eliro el la fundo de la mizera vivo; plue, venis al ŝi limo de pacienca elteno kaj ŝi eksplodis; oni diras ankaŭ, ke fine de la sinsubpremo ŝi atingis sian metodon de memesprimo. Ĉe malsimpatia kazo, oni simple juĝas, ke tio estas unu speco de mensmalsano.

Se homoj ne kredantoj pri la ekzisto de

la dispirito provas interpreti la fenomenon “Kamigakari” per psikologia pripenso, oni povas tion trovi neevitebla; la diposedo de Oomoto-fondintino ne estas kaptebla kiel simpla psikologia fenomeno, ni do volas nepre aserti, ke ĝi estas io superanta ĉion tian, tute alidimensia, pure di’volita. Certe, la fondintino Nao prilekis ĉian angulon de la mizereco en la mondo dum la ĝistiam viva. Ŝi estis ŝarĝita dorse per neelportebla ŝarĝo, ŝi paŝis longan vojon en netolerebla malfacileco. Sed tio estis taskita de Dio, kiel necesa asketismo, “por uzi en la rolo” de la fondintino de Oomoto. “Kiu havas multege da ĉiela misio, tiu havas multe da sufero.” Tio estas ja fera regulo de la antikveco.

En la daŭro de dudek sep jaroj de la dudek kvina de Mejji, la fondintino skribis la penikpintaĵon en la stato de la diposedo.

La penikpintaĵo (Oomoto-diadmono), kiu atingis la nombron de ducent mil kaligrafifolioj, estis admonado de Dio al la tuta homaro; ĝi estis libro de profeta averto.

En “Kajero de la koro”, eldonita de Koŭdanŝa en la kvardek tria de Ŝoŭŭa, Deguĉi Naohi, nepino de la fondintino Nao, skribas jene pri la penikpintaĵo:

“La avino vivis ĉiam en klara, tenera mondo, kun kaŝita akra sensiveco, sekve je la penikpintaĵo pri la malkonstruo kaj rekonstruo de la mondo mane skribita de la avino, estas funde klara varmece.

Tio okazis de tio, ke fone de la personeco kaj travivaĵo de vivo de la

avino aperis la revelacioj de Dio, kaj tiajn revelaciojn la avino akceptis severe, kun sia tenera, varma personeco dediĉita en ŝia tuto; ĉe la legado de la penikpintaĵo de la avino, tio estas vere grava punkto, mi kredas.”

“Sen forigo de bona kaj malbona sortoj en la mondo, nenio iros bone; ĝis nun estis tro da bona kaj malbona sortoj, do mi igos la popolanojn ŝanĝi la koron, por glate egaligi la mondon: per unu korŝanĝo pliboniĝos.”

(penikpintaĵo en la tridek unua de Meĵi, trideka de septembro laŭ la malnova kalendaro)

“Kiam ni fikse rigardas la ĝishodiaŭan fluon de la historio de la tempo, kiam eliris tiu ĉi penikpintaĵo, ni sentas certe, ke la diferenco inter la bona kaj malbona sortoj reduktiĝas paŝo post paŝo

En la ŝanĝoj de la historio, precipe en la moderna tempo, laboras kiel dentorado respektive la saĝo kaj pasio de la homoj; sed la historio ne moviĝas sole per la dentoradoj, kaj mi sentas, ke ĝin allaboras ankoraŭ unu granda ondomovo. Tio foje okazas en formo de io hazarde eksaltanta; subite ĝi povas eĉ aperi en la historio. Tie mi sentas mirindan providencon.”

De longe oni diras, ke nun estas epoko de granda peripetio. Nur en tiu ĉi unu jarcento, la situacioj de la mondo grande ŝanĝiĝis; kaj socio kaj ŝtato, ankaŭ la homa koro, ĉio ja draste ŝanĝiĝis.

La vorto de Dio montrita tra Nao aperis en la mondo kiel historia fakto unu post alia; ni ja sentas, ke ili fariĝas nova tajdfluo, trakondukata la modernan

historion. Kio faris Nao tiel diri? Ni ne povas ne pensi, ke tie ekzistas granda volo.

Ĉiuokaze, sen la “diposedo” oni povas nenion rakonti pri Oomoto; tion oni bonvolu kompreni.

La monda fazo
estas kiel profetis
mia avino;

La mondo de Miroku nun
Jam tie proksimiĝas.

(priversis: Deguĉi Naohi)

La naskiĝo de Nao

La regiono Tanba situas meze de la gubernio Kioto, kaj najbaras je la urbo Kioto, gubernioj Osaka kaj Hjoogo. Por trairi al la direkto de San'in, distrikto Tango kaj ankaŭ Ŭakasa, oni devas trapasi tiun ĉi Tanban. La fonto de la rivero jura direktite al la Japana Maro kaj tiu de la fluo de Kacura atinganta la golfon Osaka, estas ambaŭ en la delikatdekliva montaro de Tanba. Kaj tiuj ĉi verdantaj montoj kaj la puraj fluoj donas ripozsenton kaj favoron al la loĝantoj en la baseno, kaj tiuj ĉi povas intime senti la ĝojon kaj riĉecon de la vivo.

En Tanba estas tri basenoj: Fukuĉijama, Ajabe kaj Kameoka. Tanba estas formita el tiuj ĉi tri basenoj kaj la montaroj ilin ligantaj, kaj ankaŭ la cent dek ses jara historio de Oomoto estis teksfarita surbaze de ĉi tiuj tri basenoj.

Vidate de la urbo Kioto, la plej proksima estas Kameoka, sekve Ajabe

kaj laste Fukuĉijama. Inter ili, ni poste priskribos pri Ajabe kaj Kameoka; kiuj iĝos fundamentaj sanktejoj de Oomoto, kaj ni devos nun rakonti de Fukuĉijama. Ĉar sur tiu tero naskiĝis Nao en la dek sesa tago de decembro de la sepa jaro de Tenpoŭ, fine de Bakufu (la dudek duan de januaro de la jaro mil okcent tridek sep).

Fukuĉijama, tiam en la bakuffino, estis subkastela urbo de la familio Kucuki kun tridek unu mil kokuoj; kaj estis la kastelo Fukuĉijama sur la monteto, kie kunfluis riveroj Jura kaj Haĝi. Laŭ dokumento, en la tiama Fukuĉijama estis ĉirkaŭ unu mil loĝantoj; krome estis tricent domoj de samurajoj. Ŝajnas, ke estis tri mil aŭ kvar mil loĝantoj. Multaj loĝantoj en Fukuĉijama estis komercistoj; utiligante la riveron Jura, ili frajtis al Kioto kaj Osaka teon, kotonon, rizon k.a.; ili enportis sakeon, salon k.a., kaj ŝajnas, ke tio prosperis al ili.

Aliflanke, la daimiujo Fukuĉijama en tiu ĉi Tenpoŭ-periodo estis kovrita de financa malfacileco, kaj ĝi luprenis ĉirkaŭ cent mil rjoojn de komercistoj k.a. de Osaka. Ties influoj nature alpuŝiĝis al la popolo. Tia fenomeno ne estis nur en Fukuĉijama, sed tutlanda. Spontane do tie kaj ĉi okazis puĉoj.

Ĉirkaŭ la sepa de Tenpoŭ, kiam naskiĝis Nao, multe okazis tra lande puĉoj, nome tio estis periodo, kiam la popola moviĝo atingis la zeniton. Tiel, ĉiu daimiujo falis en malriĉan staton, samtempe la popola tumulto intensiĝis, kaj la plej granda kaŭzo de tio estis en la granda malsatego de Tenpoŭ, sekvanta la

malsategon de Tenmei. En la provincoj de nordorienta regiono mortis de malsatego kelkcent homoj, oni legendas.

Ankaŭ Fukuĉijama ne estis escepto, kaj post sinsekvaj malriĉaj rikoltoj dum jaroj tiu ĉi sepa jaro de Tenpoŭ iĝis jaro de granda malrikolto pro la daŭranta pluvado kaj malalta temperaturo. Komencante de rizo, hordeo, ja ĉiuj grenoj ne rikoltiĝis, kaj la homoj enbuŝigis herbojn, kiuj kreskis sur montoj kaj kampoj; finfine, oni manĝis eĉ tatamtegaĵon kuiritan. La situacio estis tiel mizera, ke nuntempe oni eĉ ne povas ĝin imagi.

En tia malsatego Sojo, loĝanta en la urboparto Kamikonja en Fukuĉijama, estis kun intenco eltiri (abortigi) la baldaŭ naskotan infanon. Sed Take, bopatrino de Sojo, forte kontraŭis abortigon. Tiel Nao povis naskiĝi en tiu ĉi mondon. Tio estis en la dek sesa de decembro malnova, renkonte al la novjaro, kiam oni tremis de malsato kaj malvarmo.

Iam en postaj jaroj, Nao skribis jene en la penikpintaĵo pri si mem:

“.....La korpo kaj animo ligita en kaŭzo kaj rezulto. Jam denaske estis naskita en la jaro de tia malfeliĉo.” (La dudek sesa de septembro de la tridek kvina jaro de Meĵji).

La naskiĝo kun tiu historio simbolis la dornan vojon trairantan la tutan vivon de Nao.

La patro de Nao estis nomata Kirimura Goro-Saburo; la patrino Sojo estis infano de Deguĉi Soŭemon de Kanmaĉi, Ajabe. La familio Kirimura estis, de kelke da

generacioj antaŭe, ĉarpentisto kun lerta brako; oni iĝis supera ĉarpentisto ĉe la daimiujo, kaj oni permesis al la majstro porti la familian nomon kaj glavon; la familio krome okupis sin per loka gastejo. La loka gastejo signifas domon, kie oni kutime gastloĝas, kiam vilaĝanoj el proksima vilaĝo elvenas oficplenumo al la subkastela urbo aŭ Ĝinŝo (la oficejo de la lokaj oficistoj).

Kiam Sojo venis edzine, la familio havis ambaŭnajbare domojn por luigi, kaj posedis sufiĉe grandan domon, kiu rigardis al strato. Ĝi cetere tenis ĉirkaŭ tri metilernantojn de ĉarpentado.

Ke Nao estis preskaŭ abortigita, tio ja rakontas, kiom kruela estis la tiama malsatego, kaj estis ankoraŭ unu kaŭzo, kiu minacis la naskiĝon de Nao, nome la malprospero de la familio. Estis jam pliaĝaj fratoj Dajkiĉi kaj Sejbej, sed en la tempo, kiam Nao levis la voĉon de ĵusnaskito, al la familio Kirimura jam mankis la iama puŝforto. Tion kaŭzis ne sole la premo de ekstere aŭ la malsatego, sed ankaŭ kaj ĉefe la konduto de Goro-Saburo, la patro de Nao. En la du antaŭaj generacioj estis honestaj kaj solidaj metiistoj, sed tiu ĉi Goro-Saburo estis alia. De sia juneco, li havis karakteron, kies koro moviĝis al libereco kaj pompeco.

Pri tio povis kulpi ankaŭ la epoko. Ĉar la urbana kulturo de granda urbo komencis doni ne malgrandan influon ankaŭ al la subkastela urbeto en San' in. La daimiujo Kucuki Miĉicuna timis pri tia dekadenco kaj orgojlo, donis popolklerigan aranĝon. Unu el tiuj estis

noo. Tio estis pensita kiel unu rimedo korekti la ekirintan malordecon en la moro.

Al Goro-Saburo tia politiko estis ekster la atento kaj, ju pli disvastiĝis grade la dekadenca tendenco, des pli li konsideris sin de sia juneco dando, komencis maldiligenti en la okupo. Ankoraŭ post la edziĝo kun Sojo, la diboĉo ne ĉesis. Ankoraŭ, kiam naskiĝis infanoj la unua filo kaj la dua filo, tio neniom lin influis; mebloj rapide malaperis unu post alia.

En la tempo, kiam naskiĝis Nao, kaj la najbaraj luigdomoj, kaj la propra loĝdomo estis forvenditaj, kaj la familio estis alpremita ĝis la fundo de mizero, ke oni pensis translokiĝi al malgranda domo.

Baldaŭ post naskiĝo de Nao, la avo Goro-Saburo (samnoma kiel la patro) alimondaniĝis sepdek kvarjara. Sekvis la unua filo Dajkiĉi, kiu de variolo formortis sepjara. Intertempe naskiĝis plijuna fratino Rijo. Tiam la familio Kirimura konsistis el Take, la avino de Nao, la gepatroj Goro-Saburo kaj Sojo, pliaĝa frato Sejbej, plijuna fratino Rijo krom Nao.

Take ne estis la naskinta patrino de Goro-Saburo, sed nur nutrinta; ŝi estis maljunulino arbitra kaj babilema. (Trade, kiom la vivo iĝis malfacila, furioziĝis Take. Kvazaŭ proporcie al tio, Goro-Saburo tiom pli lasis sin diboĉi en ludoj kaj tiom, Sojo devis surdorsigi la suferojn. Sojo estis sincera, obeema virino; ŝi kore servis al la arbitra bopatrino, prenis sur sin la tutan malfacilaĵon de la vivo.

Dum la tempo iel kaj tiel pasis, la maliceco de Take, tiel notora ankaŭ en la

najbaraĵo, grade malaperis. Bone influita de la brava korstato de Sojo, Take iom post iom ŝanĝiĝis je bona homo.

Sojo servis al la edzo ĉiel libera kaj bopatrino en la bodomo pereanta, neniom grumblis, kaj ŝi vivis akceptante ĉian ĝenaĵon; ŝi estis do modela virino en la tiama Japanujo. Nao ne povis esti ne influita de tia patrino. La pensmaniero kaj vivmaniero de Sojo poste reaperis en la vivsinteno de Nao. Sendemande de antikveco kaj nuneco, estas la patrino, kiu donas la plej grandan influon al la homformado de la infano.

Goro-Saburo finfine ĉesis esti ĉarpentisto, sed ne ĉesis diboĉi. Trinkinte sakeon, li levis la manon al la edzino kaj infanoj. Ankaŭ kontraŭ la eta Nao li agis senindulge; li ofte ŝin batis.

Pro kio tia Goro-Saburo ekideis entrepreni; tamen ial en la aĝo de tridek ses jaroj li malfermis amazakeejon. Tiam Nao estis sesjara. Tiu komerco ricevis bonan reputacion, kaj, ne atendente kelke da jaroj, li baldaŭ ĝuis la famon inter la urbanoj: "Goroŭsa la amazakeisto". Sed, kiel oni scias, inter bonaĵoj ofte sin kaŝas ankaŭ malbonaĵoj, en la tria de Koŭka (en mil okcent kvardek ses), la dek kvinan de oktobro li estis kaptita de ĥolero (aŭ malsano simila al ĥolero) furiozanta en Fukuĉijama, kaj subite forpasis post unu tago kaj nokto da suferado. Goro-Saburo estis apenaŭ kvardek unujara, kaj tio estis en aŭtuno, en la kvina jaro de kiam li starigis amazakeejon.

Tiam jam la pliaĝa frato Sejbej estis ĉe la servo en oleisto, Sojo estis, malgraŭ sia

malsanema korpo, ŝpinanta kromlabore apud la komerco de amazakeo. Kiam Goro-Saburo ne plu estis, la vivo iĝis tiom pli suferiga, kaj ankaŭ Nao atinginta dek jarojn, devis ekservi interne en la domo de Ŝinbej Kanaja ĉe urbeto Kamijanagi, Fukuĉijama.

Nao laboris en tiu servodomo sen domaĝo je siaj ostoj. Nokte ŝi diligentis ankaŭ en ŝpinado. Kaj plie, zorgante sian malsaneman patrinon, ŝi ne manĝis mem, se estis io bongusta en la porcio; ŝi kuris por ĝin donaci al la patrino; kaj krome, ankaŭ unu fojon en duonjaro ŝi ricevis "donace" de la mastro kimonon kaj ŝtofون por jukato, ŝi donacis tion rekte al la patrino.

Sojo dankis tion, kaj ŝanĝinte ĝin je mono, uzis por vivi. La sola plezuro de Nao estis vidi la figuron de la patrino ĝoji. Sojo estis fiera pri tia Nao, kaj volonte raportis al ĉiu renkontita persono pri sia fidela filino; "Ankaŭ tion ĉi al mi donis Nao, ankaŭ tion ĉi." Baldaŭ la reputacio de Nao kiel fidela filino tiel altiĝis, ke en la aĝo de dek du jaroj ŝi estis distingita de daimiuj de Fukuĉijama kiel unu el la tri fidelaj filinoj. Ŝi nature ĝuis la bonan reputacion en la ĉirkaŭajo, do okazis, ke la najbaroj diris ĉiuj al siaj infanoj: "ludu kun Naonjo."

De la aĝo de dek tri jaroj ĝis tiu de dek kvar jaroj Nao servis en la domo de Ĵuŭsuke Minatoja, kiu kumulis vendon de kimonoj kaj ties tajloradon; krome ŝi helpis ankaŭ en la najbaro Sejbej Izumija. Izumija ŝajnis esti la plej granda manĝuejo en Fukuĉijama; tage manĝuojn oni

vendis, kaj nokte “Zenzaj-moĉiojn” kaj “Nanba-moĉiojn”. Al Nao, ĉe Izumija, plej plaĉis lavi du ŝoojn da azukioj por manĝuoj ĉe proksima riverbordo. Ĉu en profunda nokto, ĉu al kiom ajn malproksima loko, ŝi alportis la menditan varon, kaj tiel ankaŭ ĉe tio ŝi ricevis la fidon de la mastro. Kaj la ĉi tie lernita manĝu-farado utilis helpi ŝin poste en kelke da okazoj malfacilaj.

Nao en la aĝo de dek kvin jaroj ekservis ĉe kimonvendejo Jonekjuŭ. Inter dek kelke da vendistoj kaj servistoj ŝi laboris. Ankaŭ ĉi tie ŝi estis laŭdata de la mastro pri ŝia kvalito kaj servomaniero. Kie ajn Nao servis al la mastro diligente kaj honeste. Kaj al kiu ajn, tio plaĉis. Dum unu jaro ŝi estis en la kimonbutiko Jonekjuŭ, kaj en septembro, kiam ŝi estis dek sesjara, Nao revenis hejmen. Post tio ŝi plenenergie laboris de frue en la mateno ĝis malfrue en la vespero helpante la patrinon Sojo.

Tiel Nao ne frekventis la lernejon en templo, nek ellernis legi kaj skribi, obligante nur la jarojn. Sed estus superflue diri ĉi tie, ke la travivaĵoj dume ricevitaj, estis tamen multo super tiaj scioj lego kaj skribo.

Nao jam, en la aĝo de ses aŭ sep jaroj, surbuŝigis la alvenon de “la mondo de Miroku”, kiel oni poste diris ĉe Oomoto. Kaj oni legendas, ke ŝi profetis etskalajn aferojn el la ĉiutaga vivo kaj ili ĉiuj trafis; kaj ankoraŭ, kiam ŝi servis ĉe la domo Kinugaŭa, ŝi sin kaŝis dum tri tagoj, kaj vepere ŝi revenis hejmen kun nebula

konscio. Demandita pri la cirkonstancoj, ŝi respondis, ke ŝi faris asketismon en la monto, oni rakontas. Nao havis jam de senhelpa infaneco, seriozan koron de kredo. Tio estas verŝajne denaska. Tiu kredanta koro neniam malaperis ankaŭ post la maturiĝo, kaj post la edziniĝo kaj kelke da translokiĝoj.

Estis cetere noo, kiun ŝi fervore spektis kun batanta koro okaze de festoj, kiam ŝi estis knabino. Tiu ĉi estis enkondukita de la daimiujo por ĝustigi la moron, malordiĝeman, kiel ni jam antaŭe menciis; kaj tiu ludo nun tiom pli prosperis. En lokaj jaŝiroj estis aranĝitaj la prezentadoj de nooj, kaj ŝajnas, ke tion Nao preskaŭ ĉiujare aprezis. La noo-ludo penetris al Nao profunde en la koron, kaj ĝi neniam malaperis en ŝia vivo. En noo estas beleco profunde polurita tra la longa tradicio. Ŝajnas, ke Nao, allogita de tiu profunda beleco, kaj trasentis la Jugenon de noo-ludo. Poste, oni rakontas: al Naohi, nepino, ŝi ripete rakontis pri la pecoj prezentitaj en jaŝiroj, kaj la manieron de la prezentado.

La noo-ludo, kiun vidis Nao, estis reprezentita, kvardek jarojn poste, post la diposediĝo de Nao, kaj tio iĝis bazo por prosperanta Oomoto-noo en la nuna tempo; tio plie iĝis deirpunkto por la servoprezentado de noo fare de la oficistoj de Oomoto en la malproksima Katedralo Canterbury de la anglikana eklezio en Britujo.

tria parto

ĈION KREAS LA ANIMO

2

Hidemaru Deguĉi, tradukis Eizo Itoo

Destino kaj sorto

Mi volas fari distingon inter destino kaj sorto, kiel jene:

La destino estas Dia decido ne ŝanĝebla. La sorto estas la procedo laŭ kiu la destino estas plenumata.

Por la homo tre dankinde kaj interese estas ke li povas ekspluati sian sorton kaj ĝin plibonigi, eĉ se la destino estas malfavora, pro lia antaŭa vivo.

Iu arbo havas la destinton, ekflori en printempo. Kvankam oni ne facile povas ŝanĝi tiun destinton, oni povas bone zorgi, ke ĝi portu pli multe da floroj, ol en la pasinta jaro. Tiel same, ne, pli multe da libereco ĝuas la homo. Provizita estas vasta kadro por homa penado. Do homo tute ne devas deprimiĝi pro malfavora destino; laŭ la penado, laŭ la kredo en Dio, li povas venigi bonan sorton. Male, se homo perdas esperon kaj degeneras, li devas havi pli malbonan sorton, ol destinite. Kvankam la vojo de ies vivo estas pli malpli fiksita per la destino, la grado de la ĝuo de l' vojirado senlime diferencas laŭ lia sintenado.

Estas destino kaj sorto ne nur por

individua homo, sed ankaŭ por ĉiu organizo, ĉiu nacio kaj ĉiu gento. Ĉu iu nacio prosperas aŭ ne, tio ne dependas nur de la nuna generacio. Influas la apriora kialo, la destino. Se iu naskiĝis en iu familio, en iu lando, tion ne decidis li mem, nek liaj gepatroj. Ĉio estiĝis laŭ Dia volo. En tiu ĉi senco homo devas volonte akcepti sian destinton kaj samtempe strebi por venigi pli bonan sorton.

Malbonoj de la fajra civilizacio

Estas vero, ke la medio ŝanĝas la korpon kaj eĉ la koron de homo. Sed neeble estas komplete ŝanĝi la tutan karakteron; nur provizore ŝanĝebla estas ĝia supraĵo.

Oni diras ke facile produktblas la varioj de plantaĵoj. Sed tiuj varioj estas nur iom diferenciĝintaj de la originaloj. Tre malfacile estas artefari variojn sur kiu oni tute ne povas rekoni la originalon. Tre malfacile, sed ne tute neeble.

La karaktero estas la koaguliĝo de la ecoj kaj kutimoj de la pasinteco. Do

kvankam estas tre malfacile artefari novan specion, relative facile estas naski ion, kio portas iaman, pasintan econ.

Estas vero, ke la staturo de la japanoj lastatempe subite pli altiĝis pro ŝanĝiĝo de l' cirkonstancoj. Sed tio okazis pro tio, ke ilia staturo kiu estis alta en la antikva tempo, poste malaltiĝis pro la cirkonstancoj, nun denove dank' al la novaj cirkonstancoj reakiris la iaman altecon.

Do oni povas diri, ke la karaktero estas ia potencialo, kiu provizore montras alian formon kaj tamen en la interno neniel perdas sian econ.

La materia renesanco fontis en Italio kaj disvastiĝis tra tuta Eŭropo. La spirita renesanco kredeble fontos en Japanio por disvastiĝi tra la tuta mondo.

La japanoj ankraŭ ne plene memkonscias pri la dankindaj karakterizaĵoj de sia lando nek pri la bonaj ecoj de si mem.

La kialo de la disordo de la mondo ne estas simple en tia supraĵa fakto, ke la homoj perdis la moralecon. Ĝi ja fontas en la origino de la universo. Ĝi rilatas ne nur la aferojn sur la terglobo, sed tiujn en la tuta universo.

La prakialo vere estas en la plej altklasa Dia regno, alte super la reala mondo.

La fajro estas io senpacienca, hastema kaj varmega. Tial ju pli progresas la civilizacio, kiu uzas la fajron, des pli

senpacienca, hastema kaj varmega fariĝas la homa koro. Ĉiuj progresoj de la moderna civilizacio devas atribuiĝi al la fajra forto. Ni ricevis ĝian grandegan favoron, sed aliflanke dank' al ĝi la homa koro fariĝis senpacienca, la vivo fariĝis tre streĉa kaj okazas bataloj senĉese. Ĉio ĉi tio fontas en la fajra civilizacio.

La origino de la fajro estas la suno. Oni povas diri ke la mondo tiel malordiĝis dank' al la tro forta potenco de la suno. Alivorte, pro la malordiĝo de la suna regiono.

La unua plej grava punkto por la rekonstruado de la mondo estas en tio, ke la homoj devas fariĝi sincere humilaj al si reciproke. Ili devas forigi la fieremon, ili devas elkore kompreni, ke ĉiu estu ĝuste tia, kia decas al li.

Antaŭ ĉio for la orgojlo!

Post vera malfacilego senelireja plenumiĝas vera rekonstruado.

La mondo neniam ŝanĝiĝos, dum la homaj pensoj restos neŝanĝitaj. Kaj estas la plej malfacila afero ŝanĝi homajn pensojn.

La materio estas la sekvaĵo de la spirito, tial oni devas paroli pri la spirita vivo, se temas pri homa feliĉo.

Ke homo ne fariĝas feliĉa nur pro kontentigo pri materio, tion scias eĉ trijara infaneto, kiam ĝi jam kontentas je lakto. Ĉiuj homoj scias ke ekzistas du

flankoj spirita kaj materia rilate la homan feliĉon. Sed lastatempe pro veneniĝo per la materiismo multaj homoj neglektas la principon de “spirito super korpo” kaj fervore sin fordonas nur por kompletigo de materiaj eksteraĵoj, kredante, ke ilin certe sekvos la spirita kondiĉoj. Tre bedaŭrinde ilia penado estas kondukata al ĝuste kontraŭa direkto.

Por venigi feliĉan mondon estas neniu alia rimedo ol penetrigi la kredon kaj la amon.

Preferinda estas la civilizacio, sed ĝi sola ne feliĉigas la homojn.

Al la gejunuloj ĉiam donu taskojn unu post alia tiel ke ili havu nenian vakuon tiel en la koro kiel ankaŭ en la korpo.

Lando de senbrida elspezo pereas, lando de malfrua enlitiĝo, malprosperas.

“Simpligo de la vovo” kaj “sanaj ŝatokupoj” estas du sloganoj, kiujn nun la konsciaj virinoj devas laŭtvoĉe apelacii al la socio, ĉu ne?

La scienco kaj la religio unueciĝas. Nur la vojoj diferencas.

La pubereco estas la tempo edziĝi

Por la homa vivo la plej grava afero estas “Edziĝo” ① . Malsukceso en geedzeco estas malsukceso de la tuta vivo. Malgraŭ ĉio oni povas toleri nur se ambaŭ animoj iel harmonias. Ju pli granda la diferenco inter la animoj, des pli

netolerebla fariĝas por ambaŭ.

Oh, gejunuloj, mi nur deziras, ke vi akiru nepre veran “Amon” ② eĉ se nenion alian vi akiros.

Neniu estas pli feliĉa en la mondo, ol la “Geedzoj” ③ en bona harmonio. Nur se la geedzeco estas sincera kaj en bona ordo, homo povas toleri ion ajn alian relative facile. Se ne, kompleta fuŝo estas la tuta vivo, ne riparebla nur per la pensmaniero.

Neniu admonas junulon, ke li ne manĝu, sed multaj predikas, ke li subpremu la seksdeziron. Klara eraro. Gejunuloj, jam adoltiĝintaj, prefere eniru en edzegan vivon.

Ankaŭ la socio rekonu, ke adoltulo kiel eble plej frue edziĝu. Se ne, solulo ne povas komplete plenumi sian taskon.

Iuj diras, ke por edzeco taŭgas aĝo de pli ol tiom kaj tiom da jaroj, laŭ vidpunkto de la moderna medicino. Tia konceptisma limigo riskas tre gravan eraron.

La pubereco multe diferencas laŭ la loko kaj persono. Kvankam oni avertas la malbonon de tro frua edziĝo, ni prenu dek bonojn anstataŭ unu malbono. Se la cirkonstancoj de la familio permesas, oni edzigu aŭ edzinigu fil(in)on, kiu montras ian puberecon, ne gravas, ĉu li (ŝi) estas nur dek ses aŭ dek sepjara. Se ne, okazas tre multaj malbonoj pro neglektado de la naturo.

① ② ③ Noto de trad.: en la japana originalo estas uzataj ĉi tiuj Esperantaj vortoj.

Lastatempe, dank' al la progreso de la scienco la homoj ekhavis la kutimon sin obeigi al la scienca teorio, eĉ ignorante la naturon. Tio estas terura kutimo. La nuna scienca teorio estas por tiel diri provizoraĵo en periodo de ekzamenado.

Estas grava absurdo ĝin respekti kiel ion absolutan kaj neglekti la postulon de naturo.

Estas naturo, ke viro sopiras virinon kaj virino viron. Kaj tie kuŝas la kialo de grava malordo kaj peko. La interrilatigo de geviroj devas esti problemo de animo, sed neniel de materio.

Plej terura afero estas, ke dum la juneco homo fariĝas sklavo de seksdeziro kaj postlasas gravan pentindaĵon. Se iu spertis tian eraron, li devas definitive turni la vivlinion kaj nenion alian. Se ĝi entenas ian malpuran kondiĉon eksteran, ĝi estas nenio alia ol falsa amo. Troviĝas en la mondo multaj homoj, kiuj estas absorbitaj de falsa amo, kredante ĝin vera amo. En tia okazo la okuloj de pliaĝuloj relative pli trafe penetras la veron.

La edziĝo estas unu el tri plej gravaj pordegoj de la homa vivo, krom du aliaj t.e. la naskiĝo kaj la morto. Post la unua naskiĝo, la edziĝo estas la dua naskiĝo kaj la morto estas la tria naskiĝo. Ĉiuj tri estas sub influo de iu nevidebla mistero. Sed la edziĝo estas afero ne tiel difinita kiel du aliaj. Tie estas tre vasta kadro de homa libervolo, tiom pli homo devas dediĉi profundan konsideron.

Escepte specialajn cirkonstancojn,

teni fraŭlecon spitas la Naturon. Sed tamen pli bona estas fraŭleco, ol teni malfeliĉan geedzecon pro erara elekto. Memkompreneble la geedzeca vivo atingita per reciproka bontrovo kaj kune ĵuranta la eternan amon, estas milionoble pli bona, ol la fraŭleco.

Aliflanke amo naskiĝas per simpatio kaj penado. Geedzoj, kiuj ne estis tiel intimaj en la komenco, povas iom post iom alproksimiĝi al si reciproke ĝis fine ili ĝuas la ĝojon de perfekta unueco. Do geedzoj, unu fojon ligitaj per reciproka ĵuro, devas kune klopodi, tratabante malfacilaĵojn.

Lastatempe okazas tre seriozaj problemoj koncerne la interrilatigon geviran. Ne estas troigo se oni asertas, ke tie burĝonas ĉiuj malbonaĵoj, kiel maltrankvileco, malagrableco kaj senpacienceco k.t.p. de la mondo. La hejmo estas la unika ripozejo de la homa vivo, la geedzeco estas la plej malgranda sed nepra surtera bazo de la ĉielregno. La junuloj devas serioze trakti la geviran interrilatigon, kiel aferon sanktan.

La plej originala kialo kaj la plej multaj kondiĉoj de homa peko devenas de la gevira interrilatigo. Aliajn aferojn homo povas relative facile rezignacii, kaj ankaŭ oni povas facile reordigi. Malfacile estas kun interrilatigoj geviraj, ĉar ili estas problemoj de interŝanĝo de animoj. Se la mondo estas perturbita kaj ne iras en ordo, tio venas de la malordiĝo de la gevira interrilatigo, kio estas la plej grava fundamento. Ju pli grandiĝas ĝia

malordo, des pli akceliĝas la malprospero de la socio, kiel ajn kompletaj estu la ekstera kulturo kaj la sociaj instancoj.

En la periodo, kiam la gevira interrilato estis tenata en bona ordo, tie estis vivo de ĉielregno, plena de trankvileco, eĉ se tre malalta estis la kulturo kaj mankis oportunaj iloj kaj rimedoj.

Al la tempo de pereigo de Romo ĝuste similas la nuna. La tuta socio estas kvazaŭ en tiu jama tempo kaj ĉi tio estas problemoj de animoj. La edzo deponas al la edzino de sia animo. Kiam tia reciproka konfido perturbiĝas per triangula aŭ kvarangula rilato, jam ne helpas kia ajn prediko pri toleremo kaj neofendiĝo.

En la antikva tempo, laŭ diversaj familiaj sistemoj, homoj estis devigitaj edziĝi per ordono de la patro, feŭdmastro aŭ plialtrangujo. Sub tia sistemo tamen konstruiĝis ne difektebla eterna palaco, se la koncernuloj agas kun sincera fideleco. Nuntempe ĉio fariĝis multe pli libera, kaj se tamen la afero ne iras en bona ordo, tio estas kaŭzita de la manko de seriozeco kaj sincereco ĉe la geedzoj.

La vera amo estas unu sama ne nur inter geedzoj, sed ankaŭ inter fratoj, inter mastro kaj servisto, inter amikoj kaj inter homoj universale. Amo ne naskiĝas en homo, se li aŭ ŝi mem ne klopodas zorgi por la alia. Homoj devas esti konvinkitaj, ke la amo naskiĝas nur en reciproka servado.

Geedzoj devas neniam forgesi la mielan monaton, kaj ĉiam helpi, simpatii kaj

respekti unu la alian, kaj eĉ dum provizore aparta loĝado, ili devas reciproke preĝi por la bono de alia kaj sincere tenadi la interkomunikecon de l' animoj.

Kiam naskiĝas arbitremo en unu, nepre en la alia okazas la samo. Kiam aperas fendo en la koro de edzino tio nepre speguliĝas en la koro de l'edzo kaj fine rezultas grava afero, tute ne atendita. Post ĉio, senĉese pripensadi unu la alian, tute egale ĉu en kunvivado, ĉu en aparta loĝado, estas la sekreto ne naski korfendon kaj profundigi la geedzan amon.

Inter la animoj sur la sama ŝtupo iam ajn efektiviĝas reciproka amo, kiu unu fojon efektiviĝinta jam neniam disfalas. Jen tia estas la ideala edziĝo.

Ju pli granda estas la diferenco inter la ŝtupoj, sur kiuj respektive situas la animoj, des pli vasta fariĝas la kanalo, kiu ilin disigas kaj tiom pli ne natura fariĝas ilia geedzeco. Tion mi diras rilate la karakteron de l' animoj, sed neniel rilate la aposterioran instruitecon, fizionomion k.s.

Nur dank' al la edzino la edzo povas labori.

Estas malfacile por viro elmontri la kapablon, pli ol dece al la edzino.

